# Ju pli des malpli

*Ju pli la mondopartoj proksimiĝas, des pli la homoj malproksimiĝas.*

Kiam ne ekzistis veturiloj, la homoj iris piede en sia vilaĝo, aŭ urbo. En domo kutime loĝis tri generacioj kaj proksime al ili la parencoj. Biciklo, tramo, aŭto ebligis pli rapidan kaj pli malproksiman translokiĝon.

Trajno permesis veturi tra lando kaj inter landoj. Ŝipo kaj aviadilo ebligis vojaĝon al aliaj mondopartoj. Veturi ien ajn jam estas proksime kaj rapide.

Tio kaŭzis, ke homoj forveturis el siaj gepatraj domoj serĉante pli bonajn vivokondiĉojn, aŭ por studi, aŭ por krei propran familion.

La laboro ne permesas ofte viziti la gepatrojn. Dum libera tempo oni preferas vojaĝi al ripozlokoj, aŭ viziti aliajn landojn. La mondo estas pli interesa ol la maljunaj familianoj. Post kelkaj jaroj de memstara vivo oni malkutimiĝas de la familianoj. Ju pli malproksime oni loĝas kaj malofte vizitas la familianojn des pli rapide la familiaj ligoj malaperas.

Restas nur familiaj "sentaj protezoj" okaze de solenaĵoj: interparolo per telefono, bildkarto.

Dum la rapida vivoritmo eĉ la letero estas teda.

Teknikaj eltrovaĵoj komfortigis la hejman vivon. Oni jam ne devas fari multajn malfacilajn laborojn, kiuj rabis multe da tempo.

Malgraŭ tio, homo volas malpli labori. Plej volonte li ne laborus, se ne devus.

Proverbo diras:

> ***"Donu al iu fingron, li postulos tutan manon".***

Tia estas la homo.



**Tasko:**

1. Priparolu laborojn, kiujn la homoj devis fari en vilaĝa domo antaŭ cent jaroj. Kial tiuj laboroj ne estas nun necesaj en komforta loĝejo?
2. Nomu anojn de tri generacioj en familio.
3. Kion faras kamparana mastrino por kuiri kokinon? Kion faras urbanino por kuiri kokinon?
4. Listigu laborojn bezonatajn por lavado de tolaĵoj kaj bano por familio en vilaĝa domo sen elektro.

## Helpaj vortoj:

**A**kvo - arbo

**B**alaaĵujo - bano - besto – boligi – bredi - bruli

**E**lektro - elektra fornelo - elverŝi - elpreni - enverŝi

**F**ajro – forno - forŝiri

**G**asa fornelo

**H**aki - hakilo

**L**ampo – lavi – lavmaŝino – lavtabulo - legomo – ligno - lumo

**K**analaro – krano - kuiri - kuranta

**M**alfacila – malpura – malvarma - mortigi

**N**ecesejo

**P**aŝti - planti – plugi – plumo – porti – preta – preparita – purigi - puto

**R**ikolti

**S**apo – segilo – segi - semi - sitelo

**T**olaĵo - tranĉi

**V**arma - varmigilo